# Landa Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
## la 21-24an de julio, 2006, Nov-Jorko



**Pri Nov-Jorko: Nov-Jorko estas konata pro siaj historio, energio, kaj kontrastoj. Ĉefurbo kolonia kaj nacia, komerc-haveno, centro por fabrikado kaj financado, turista celo, kaj pordo por enmigrado leĝa kaj kontraŭleĝa, Nov-Jorko prezentas arkitekturon monumentan kaj malpurajn trotuarojn, komercviglajn stratojn kaj kvietajn aleojn. Tie loĝas la plej riĉaj kaj la plej malriĉaj usonanoj, kaj ankaŭ anoj de ĉiu lando.**

**La Kongresejo:** La Kongreso okazos en la Fashion Institute of Technology (FIT), en la Student-Centro Dubinsky ĉe Avenuo 8 apud Strato 28 en Manhattan. Loĝado haveblos en dormejo de la New School kaj en la Hotel Pennsylvania; detaloj troviĝas sube.

**La Kongreso:** La registrado komenciĝos vendredon je la kvara ptm, la 21an de julio. Je la sepa ptm okazos Interkona Vespero. La kongresa programo okupos la tutan sabaton kaj dimanĉon. La bankedo kaj aŭkcio okazos sabate vespere. (Oni rajtas partopreni la aŭkcion sen registriĝi por la bankedo.) Dimanĉe oni planas Muzikan Vesperon. Lundon matene okazos pluraj programeroj, kaj fine la Solena Fermo je la 11a atm. Postkongresaj ekskursoj okazos lunde posttagmeze kaj ankaŭ marde, laŭ la interesiĝo. (Bonvolu informi nin ĝis kiam vi intencas resti en Nov-Jorko kaj kiuj ekskursoj interesas vin. Priskriboj de la ekskursoj troviĝas poste en la informilo).

**La Programo:** Krom prelego pri la lingva reformprojekto de Zamenhof en jaro 1894, okazos ankaŭ prelegoj pri Volapuko, la antaŭanto de Esperanto, kaj pri la ludeca planlingvo, Toki Pona; deklamoj de tradukaĵoj; kaj slam-stila konkurso de Esperanta poezio. Okazos aferkunsidoj de la Amerika Asocio de Esperanto-Instruistoj (AAEI) kaj la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo (ISAB), kaj oni povas fari ekzamenon de AAEI. ELNA kunvokos sian jaran aferkunsidon, kiu enhavos pluran diskutojn pri la proponita nomŝanĝo kaj la nova laborplano. Okazos almenaŭ unu diservo. La jena ne estas la tuta programo. Se vi havas ideon pri programero… ni bezonas ankaŭ *vin*.

### Verturi al la Kongresejo

**per aviadilo:** La urbon Nov-Jorko servas tri ĉefaj flughavenoj: JFK, Newark Liberty, kaj Laguardia. Kaj JFK kaj Newark Liberty konektiĝas al fervojo trairanta Manhattan-on ĉe la stacio Penn Station, kiu situas kvar stratojn (300 m) for de la FIT. Taksioj kaj flughavenaj busetoj estas alternativoj por veturo el la tri flughavenoj.
**per trajno:** Loĝantoj de la orienta parto de Usono povas verturi per la fervojo Amtrak al stacio Penn Station, Nov-Jorko (bonvolu ne konfuzi tion kaj la Penn Station en Newark, Nov-Jerzeo!).
**per aŭto:** Kongresanoj vojaĝantaj per aŭto sciu, ke la parkado kostas po $20 ĝis $40 tage dum la semajnfino. De la sudo aŭ okcidento konsilindas eniri Manhattan-on per la tunelo Lincoln Tunnel aŭ la ponto George Washington Bridge. De la nordo uzu la ŝoseojn Henry Hudson Parkway kaj West Side Highway. De la oriento uzu la tunelon Midtown Tunnel.
**per aŭtobuso:** Aŭtobusoj al Nov-Jorko alvenas al la stacio Port Authority Bus Terminal apud Strato 42 kaj Avenuo 8. Poste bv. veturi per metroo aŭ taksio al FIT.
**pliaj informoj:** Oni sendos al aliĝantoj detalajn instrukciojn por veturado, kiuj ankaŭ haveblos ĉe la kongresa retpaĝo.

### Loĝado en Dormejoj de la New School:

- Tarifoj: ĉambro kunluita: po $50 por nokto; privata ĉambro: po $65 por nokto
- Certa kvanto de privataj ĉambroj kaj ĉambraroj (por loĝado kvaropa) haveblas.
- Oni povas nomi ĉambro-kunulon en la loĝpeta formularo
- Postulatas antaŭpago de $100. Oni ne povas ŝanĝi enir- kaj elir-datojn post registrado
- Haveblaj enirdatoj: la 19a-21a de julio; elirdatoj: la 23a-26a de julio

La plej taŭgaj ĉambroj situas ok stratojn (700 m) sude de la kongresejo. Konsilindas frua registrado.

**Enskribu la New School Housing loĝpetan formularon kaj kontrakton** kaj enpoŝtigu ĝin antaŭ la 1a de junio rekte al la adreso donita en la formularo. (Ne sendu ĝin al ELNA.) Dormĉambroj eble ne haveblos post la 1a de junio. Bonvolu legi la kondiĉojn de la loĝpeta formularo.
**Loĝado en Hotelo:** ELNA havas kontrakton kun la Hotelo Pennsylvania por certa kvanto de ĉambroj ekde la 20a ĝis la 24a de julio. La hotelo situas tri stratojn (250 m) norde de la kongresejo. Oni devas telefonvoki la **New York's Hotel Pennsylvania** Reservation Office dum labortempoj ĉe **212-736-5000, ext. 8460** aŭ senpage ĉe **1-800-223-8585** por mendi sian ĉambron antaŭ la limdato la **29a junio, 2006.** Menciu ELNA-n por pagi la grupan tarifon: po $159 por

loĝado sola aŭ duopa, po $174 por triopa; po $189 por kvaropa. Aldoniĝas al tiuj tarifoj impostoj de 13.375% plus $3.50. Elregistrado antaŭ via anoncita elirdato rezultigos al vi kotizon je $50. Notindas ke tiuj, kiuj registras sin frue, povas trovi ĉambrojn eĉ pli malmultkostajn ĉe la retpaĝo www.hotelpenn.com.

## Piediraj Ekskursoj

**La Vestaĵkvartalo:** Historie la kvartalo norde de la kongresejo estis centro por vestaĵfabrikoj, amasvendistoj kaj provizistoj, kaj ankaŭ de peltkomerco.
**Chelsea:** Hodiaŭ diversklasa loĝejkvartalo, ĝi estas loko, kie estis verkita la fama poemo "Estis la Nokto Antaŭ Kristnasko" *("'Twas the Night Before Christmas")* Chelsea rapide fariĝas centro por artkomerco, kaj ĉ. 400 galerioj nun troviĝas tie.
**Akvoborda Parko Chelsea:** Iru sude laŭ la Avenuo 8 ĝis Strato 23 kaj tie turniĝu dekstren por atingi la Riveron Hudson. La parko sekvas la rivero maldekstren.
**Areno Madison Square Garden (MSG):** Iru norde laŭ Avenuo 7a ĝis Strato 31a por trovi grandan rondan konstruaĵon kiu kovras kvar urboblokojn. Okazejo de sportaj eventoj kaj koncertaj, MSG okupas la lokon de la iama stacio Pennsylvania Station, arkitektura majstroverko, kies detruo por krei MSG instigis la komencon de la movado por konservi la novjorkajn monumentojn.
**Turo de la Empire State:** Ĉe Strato 34 inter Avenuoj 5 kaj 6. La arkitektura stilo "*Art Deco*" videblas sur la eksteraĵo kaj en la vestiblo. Observejo sur la 86a etaĝo prezentas belan panoramon de la urbo. Pro sekureckontrolo kunportu identigilon kaj neniujn grandajn pakaĵon.
**Times Square:** Iru norde laŭ Avenuo 7 ĝis Strato 42.
**Placo Union Square:** Sekvu Straton 23 orienten ĝis Broadway kaj poste suden. Survoje vidu la Konstruaĵon *Flatiron* ĉe Broadway kaj la 23a Strato, la unua domturo de Nov-Jorko. Staru ĉe la pinto kaj rigardu supren. La Placo kaj la apuda Strato 14 somere gastigas vendobudojn kaj malmultkostajn vestaĵojn.

## Postkongresaj Ekskursoj

**Turisma Krozado ĉirkaŭ Manhattan:** Eĉ en le somera varmego la brizetoj super la akvo regalos vin, dum vi rigardas la urbon panorame. Gvidanto priskribas la monumentojn kaj la historion de la urbo. Nov-Jorko havas ok pendopontojn, kaj vi vidos aŭ subveturos ses aŭ sep el ili. Trihora krozado kostas $29.
**Turisma Aŭtobuso tra Manhattan:** Malpli rapida ol la krozado, ĝi penetras ĉiujn partojn de la insulo. Ekzistas pluraj itineroj en Manhattan, kaj vi povos pasigi la tutan tagon en esplorado. Oni povas ekhavi transirbileton por laŭplaĉe eliri kaj reeniri alian aŭtobuson. Variaj prezoj ekde $49.
**Statuo de Libereco/Insulo Ellis:** La Insulo Liberty havas parkon kaj la statuon, kies interno estas malhumidigita kaj lumigita. Tre interesajn detalojn de la struktura framo oni rimarkigas. Muzeo en la bazo de la piedestalo klarigas la historion kaj la konstruadon de la monumento. Inkluzive atendovicon por eniri, la vizito daŭros tri ĝis kvar horojn. Sur Insulo Ellis oni povas viziti la ĉefan akceptejan halon, kie 12 milionoj da enmigrantoj eniris la Usonon. Kortuŝajn historiojn elvokas la ekspozicio. Pramoj daŭre foriras de suda Manhattan kaj iras al ambaŭ insuloj. Per la bileto oni rajtas viziti ambaŭ insulojn. La kotizo estas $11.50.
**Unuiĝintaj Nacioj:** Gvidata vizito al la konstruaĵo kaj tereno daŭras horon je la kosto de $12.
**Insulo Coney:** Historia amuzejo en Brooklyn. Veturu tie per metroo. Manĝu frankfurtajn kolbasojn. Bileto por libera eniro al la plejparto de la amuziloj dum seshora periodo kostas $23.
**La Bronksa Zoo kaj Botanika Gardeno:** Pasigu la tutan tagon vizitante tiujn apudajn parkojn. Veturu per metroo. Bileto por la zoo kostas $8. La ĝardeno prezentas diversajn programojn kaj eventoj, kaj enirprezo varias depende de la enhavo. La baza eniro kostas $5.
**Muzeoj:** La Muzeo de Naturhistorio havas unu el la plej grandaj kolektoj de dinosaŭroj kaj Planetarion Hayden. La Metropolitena Muzeo de Arto havas kolektojn de klasika arto, antikvaĵoj kaj mezepokaj arto kaj kirasoj. La enirkosto estas $5 -8. La Indiĝena Muzeo prezentas arton kaj artaĵojn de la Amerikoj.

